INFORMA BULTENO POR ĈEĤAJ ESPERANTISTOJ
ELDONAS PREPARKOMITATO DE ĈEA-KLERIGA INSTITUTO EN PRAHA

# ★STARTO

Januaro - Februaro 1969 N-ro 1

## 1952 – LA VOJO –1969

"KAJ NIN NE TIMIGAS LA NOKTAJ FANTOMOJ..."

Post dek sep jaroj proksimiĝis la momento, kiun tiel emocie karakterizis en nia enketo s-ano Berka, skribante: "...stariĝu jam ankaŭ en nia respubliko memstara organizaĵo kaj kunigu ĉiujn verajn samideanojn, ke ni kune eklaboru kaj pere de Internacia Lingvo diversloke, diversmaniere kaj tamen unuece provu helpi al nia ŝtato kaj ĝia popolo."

Mi imagis, kiel tiuj aŭgustaj tagoj ŝokis la gesamideanojn en Vsetín, kiuj daŭrigis sian laboron por la ideo de la interkompreniĝo; ili daŭrigis ĝin modeste kaj baldaŭ sukcesis kreskigi la frukton de tiu ĉi laboro: la internacian legolibron. Estus interese ekscii, kiom da aliaj diligentis tiam pri l taskoj similaj.

Sed precipe nia ideo progresas - sendepende de portempaj obstakloj el ekstere kaj restas esence la sama kiel en la tempo de sia naskiĝo.

Tiu ĉi simpla fakto estis ankaŭ nun funde pruvita.

"NI DANKAS LA VENTON KAJ REPURIGITAJ NI FORTON PLI FRESAN AKIRAS"

La tempo, kiam la afero de Internacia Lingvo estis ofte eĉ ne dezirata flanke de oficialaj instancoj, kuŝas jam malantaŭ ni. Povas esti, ke multaj adaptiĝas kun miksitaj sentoj al nova realo: estas ja klare, ke kvankam antaŭ niaj klopodoj ofte spitis la pereon aŭ fine ne evitis ĝin, tamen des pli evidente, ke ili ne estis vanaj.

Antaŭ 17 jaroj ni estis izolitaj kaj tio havis sian kromefikon en niaj propraj rondoj. Kiam estis kreita la Tutŝtata Konsulta

/daŭrigo sur la 3-a paĝo/

/ La vojo...
/daŭrigo de la 1-a paĝo/

Komitato por Esperanto en Ĉeĥoslovakio kaj pli poste Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, tiu kompromisa rezulto estis granda paŝo antaŭen. Sen tiu ĉi minimuma ebleco, sen kelkĉiekoj da oferemuloj kaj aliaj konsciaj laborantoj, ni estus hodiaŭ sendube malpli kapablaj ekstari antaŭ la fakto de la memstariĝo.

Ni bonvenigis jubile la historian jaron 1968, ĉar ĝi promesis plenrajtan ekziston ankaŭ por nia movado. Ni plue penos konvinki pri tio ĉiujn niajn amikojn kaj samideanojn eksterlande kaj nepre rezistos klopodojn misprezenti la strebadon de nia popolo. Falsaj informoj nur helpus reinstalon en nia lando de tia reĝsistemo, kiu ne toleras la ekziston de organizaĵo por Lingvo Internacia.

"NI, PAĈO POST PAŜO, POST LONGA LABORO, ATINGOS LA CELON EN GLORO"

Laŭ la malnova latina proverbo oni rajtas diri, ke ne nur la libroj havas sian sorton; tiu sama organo, laŭ kies rekomendo likvidiĝis EA ĈSR, aprobas hodiaŭ statuton de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Oni povas rezoni, pri kiu parto de tiu ĉi formala decido meritas la ŝtata aparato kaj pri kiu alia la menciita organizaĵo. Ni demandu, ĉu venonte anstataŭ premo de aŭtoritatoj, ni ne devos fronti bagatelaĵojn - verŝajne neeviteblajn post longedaŭraj kaŝiteco kaj manipulado de supre. Nur superinte ilin la movado povas transiri el la kadro de amatora kaj privata afero sur la bazon de profesia kaj universala aktiveco.

La ĉefan garantion mi vidas en la atingoj de la junularo, kiu estas efektiva motoro de nia enlanda movado kaj havas ŝancon iĝi avangardo de la movado tutmonda.

Ni ĉiuj deziru tion - antaŭ la fonda kongreso de nia asocio.

Oldřich Kníchal

o - + - o - + - o

Společné zasedání ČSEV, PV ČES, SM ČSEV a PV ČSEM

Na společném zasedání 1. - 2. února v Praze představitelé jednotlivých složek projednávali některé otázky v souvislosti s přípravou ustavujícího sjezdu ČES 29. - 30. 3. v Brně.

Na pořadu jednání byly především záležitosti finančního zajištění nové organizace, strukturální postavení mládežnické sekce a spolupráce se slovenskými esperantisty, jejichž zástupci, zejména z mladší části, byli na zasedání přítomni.

Byl schválen m. j. také konečný návrh kandidátky do Ústředního výboru svazu. Mezi navrženými jsou i tři ženy. Z celkového počtu 29 má být zvoleno 17 členů ÚV a 5 členů Ústřední revizní a kontrolní komise.

Kandidáti ÚV a ÚRKK ČES:

T. Balda, A. Bednařík, V. Bořánek, J. Drlík, Z. Hršel, O. Hrubý, M. Hruška, dr. J. Jermář, CSc, M. Josková, O. Kníchal, D. Kočvara, Ing. V. Kočvara, Ing. L. Krajíc, G. Kremláček, J. Mařík, dr. V. Mohapl, Ing. dr. V. Novobilský, J. Otta, Z. Polák, P. Polnický, J. Pondělíček, L. Rýznar, P. Sittauer, Ing. F. Sviták, J. Vítek, F. Wohlmuth, J. Vondroušek, D. Zdvihalová, N. Zedníčková

oooooooooo
oooooo
oo

J u l i e   Š u p i c h o v á   85 - jara

La senlaca pioniro de Esperanto Julie Šupichová, honora membrino de UEA kaj de aliaj societoj atingis la 27-an de januaro 1969 la respektindan aĝon de 85 jaroj.

Ŝi naskiĝis en 1884 en Studnice ap. Náchod, en 1907 fariĝis instruistino kaj aktivis en Červený Kostelec, Hronov kaj fine en Praha. Esperanton ŝi ellernis en 1907. Tiu jaro donis definitivan direkton al ŝia vivo: ŝi iĝis senlaca laborantino por disvastigo de la Internacia Lingvo. Ŝi fondis societojn, plenumis vicon da funkcioj en la movado, kunlaboris al sesdeko da ĉeĥaj kaj Esperantaj gazetoj sur la kampoj de edukado, klerigo kaj propagando de Esperanto, gvidis kursojn, verkis lernolibrojn, informajn verkojn pri la movado, plenumis ciklojn da prelegoj por virinoj.

La laboro kaj la verko de Julie Šupichová sur la kampo de internacia kaj interhoma kompreniĝo kaj amikeco estas neforgesebla. Ni deziras al la jubileantino bonan sanon por la pluaj jaroj kaj salutas ŝin estimoplene.

La Redakcio

x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x

D e j t e   t o   d á l . . . . .

Nadcházející sjezd bude jistě mocnou vzpruhou aktivity nejen českého, ale i celostátního esperantského hnutí, které se obnovuje jako samostatný činitel. Téměř po dvou desítkách let si opět máme zvykat na tuto skutečnost. Ale nejen my, esperantisté. Celá veřejnost a všechny společenské organizace by se měly při této příležitosti dozvědět, že se tu děje něco neobvyklého. Měly by, před sjezdem i po něm, co nejvíce uslyšet a číst o mezinárodním jazyku, jeho humanistickém poslání a významu pro všechny oblasti lidské činnosti.

Věříme, že zprávy o zajímavých počinech a akcích i nápady diktované současně zkušeností a fantazií zaplní co nevidět náš redakční stůl. Dozví se z nich o vás, o nás, nejen esperantisté doma a za hranicemi, ale i ti, kteří toho o esperantu dosud vědí jen málo. Mnohé z nich můžeme získat pro naši myšlenku, mnohé pro spolupráci. Může se nám to podařit, navážeme-li vzájemný kontakt. Esperantisté - pracovníci či spolupracovníci tisku, rozhlasu a televize spojte se nejen s nejbližšími novinami a hlasatelnou, ale i s redakcí STARTa. A naopak, zajímavosti otištěné ve STARTu mohou být užitečné i pro vaše místní zpravodajství. Naši adresu znáte: Blanická 4, P r a h a 2.

STARTO

x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x

JIŽ NYNÍ SE MŮŽETE PŘIHLÁSIT NA LETNÍ ESPERANTSKÝ TÁBOR /SET/ v Lančově u Vranova nad Dyjí. V dopise uveďte jméno a příjmení, data narození a bydliště. Termíny letošních etap: První od 13. 7. do 26. 7., druhá od 27. 7. do 9. 8. včetně. Druhá etapa je určena mládeži a junákům, členům Skautské esperantské ligy, jazykově pokročilým i začátečníkům. Táborová taxa:

| | | | |
|---|---|---|---|
| do konce dubna: | mládež do 15 let | 320,-- | od dubna 350,-- |
| | dospělí | 350,-- | 380,--. |

Chcete-li pozvat i svého korespondenta z ciziny, vezměte na vědomí, že musí mít vysvědčení o znalosti esperanta nebo doporučení svazu či klubu. Doporučujeme zvát ty, kteří jsou nám přátelsky nakloněni. V každém případě je nutno vejít ve styk s pořadatelem tábora, jímž je EK při Domě osvěty Bedřicha Václavka v Třebíči.

x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x - x

ENKETO DE STARTO ENKETO DE STARTO ENKETO DE STARTO ENKETO DE STARTO ENKETO DE ST

Ni demandis kvindek aktivulojn kaj multjarajn laborantojn de nia Esperanto-movado pri iliaj vidpunktoj rilate la jaron 1968, nome ties reehon en Esperantujo. Kolektiĝis sume 24 respondoj, el kiuj kelkajn ni devis koncizigi. En plurej kazoj la respondintoj malsame interpretis la enhavon de la sube skribitaj demandoj precipe sub la punkto 3. Ni kredas, ke ĝi estos interesa legaĵo por vi:

Kiu lastjara evento impresis Vin plej multe kaj kial?

1. en la movado enlanda,
2. en la movado eksterlanda,
3. konekse kun la problemo de Internacia Lingvo.

o - o - o - o - o

Marie B a r t o v s k á, Frýdek - Místek

1. Ĝi estis la unua de majo, la disaŭdigata procesio de prahanoj. Tiam ni estis vere (kvankam nur mallonge) liberaj. Serioze impresis heroismo de nia prezidento, la heroismo de radio-, televid-, kaj pres-agantoj kaj de la tuta popolo dum la aŭgustaj tagoj.

2. Mi plej intense kaj sukceson dezirante sekvis la flugon de Apollo 8 al la Luno.

3. La abomenindaj mensogoj, kiujn disaŭdigis dum la aŭgustaj tagoj la esperantistoj el Pola Radio, kaj la ne malpli terurej leteroj de sovetiaj esperantistoj el Odesa kaj Taŝkent.

Aleš B e r k a, Vsetín

1. Apero de la libro Interesa legaĵo. Vere admirinde kunlaboris ĉe la preparo elstaraj verkistoj eksterlandaj, same enlandaj kaj kiam la libro estis finkompostita (21/8/68) la laboro estis interrompita kaj nur travivinte eble tridek angorajn tagojn oni povis daŭrigi en la laboro, tiel ke la libro fine povis aperi.

2. Travivaĵoj dum la komuna kongreso de IKUE - KELI en Limburg. Tie kunvenis la unuan fojon "rivaloj" - katolikoj kaj protestantoj - por elprovi ĉu la kunlaboro estas ebla. 220 samideanoj el 20 landoj el 20 landoj ne kunvenadis - sed vere l a b o r i s pere de Esperanto.

3. La problemo de la Internacia Lingvo povas esti solvata nur se pli kaj pli da internaciaj organizaĵoj uzos ĝin en sia laboro. Pro tio mi simpatias kun penoj de IOE kaj ĝin subtenas laŭpove. Komprenible estas necese, ke ekzistu unu organizaĵo "tegmenta" - UEA - kiu zorgu teni kontaktojn kun mondaj organizaĵoj tiel, ke en la tuta mondo la penadoj estu harmonie gvidataj. Pro tio mi arde deziras: starigu jam ankaŭ en nia respubliko memstara organizaĵo kaj kunigu ĉiujn verajn samideanojn, ke ni kune eklaboru kaj pere de Internacia Lingvo diversloke, diversmaniere kaj tamen unuece provu helpi al nia ŝtato kaj ĝia popolo.

Augustín Č a m b á l, Martin

1. Reviviĝo de Esperanto-movado kaj eksterordinare vigla agado de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, kiu celas precipe la fondon de oficiala Esperanto-organizaĵo konekse kun la favoraj kondiĉoj por libera kaj celkonscia laboro de ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

2. Mi konstatis nenion eksterordinaran kaj rimarkindan.

3. La problemo de la internacia lingvo laŭ mia kono havis nenian influon je politikaj, ekonomiaj kaj nacíliberigaj eventoj kaj problemoj de la mondo.

Rim. de red.: Oni tamen ne povas malatenti, ke multaj politikaj eventoj influis la internacilingvan problemon.

ENKETO DE STARTO ENKETO DE STARTO ENKETO DE STARTO ENKETO DE STARTO ENKETO DE ST

Vuk E c h t n e r, Postřekov u Domažlic

1. Vivsperto akirita dum dusemajna restado en la Internacia Esperanto-tendaro en Lančov. Mi estis preskaŭ ŝokita per granda nombro de infanoj, kiu entuziasme, diligente, pacience, memvole lernis nian lingvon, ofte sub tre malfavoraj veterkondiĉoj. Mi ĉeestis la duaetapan kursaron; en ĝi preskaŭ 100 infanoj lernis, en la unua etapo laŭdire partoprenis eĉ pli da ili: 200 infanoj lernis diligente Esperanton dum ferioj - dum aliaj infanoj ripozis, ludis, bonfartis!

2. La granda formika laboro por la populariĝo de la Deklaracio de Homrajtoj. Por mi mem la krono de tiu ĉi laborpeno estas la eldono de la Deklaracio en Esperanto traduko presita tre zorge en reliefa punktskribo blindula. Tiu ĉi eldonaĵo venis al Praha multe pli frue ol estis eldonita la ĉeĥa traduko por blinduloj.

3. Mi kun strangaj sentoj observas jam dum kelka tempo la intereson de scienculoj en mondpotenca ŝtato, okupiĝantaj pri kreo de nova artefarita Internacia lingvo scienca.

Ing. Eduard F e l i x, Praha

1. La aranĝo de ĈSEK, per kiu Mikuláš Nevan povas sin plene dediĉi al la laboro por E-movado. Ĝi pruntedonis al mi multe da esperoj, kiuj bedaŭrinde esence malkreskis post la aŭgustaj okazintaĵoj.

2. La senespere prokrastata eldonado de la Plena Ilustrita Vortaro, kiu tre bremsas la enkondukon de Esperanto en la fakojn.

3. La internacia kontaktiĝo, nepre kaj urĝe necesa sekve de la teĥnologia kaj scienca revolucioj, povas antaŭenpaŝi aŭ per interkompreniĝo aŭ per potenco. La jaro 1968 demonstris al ĉiu pensanta kaj pleninformita homo, ke la dua vojo nepre ne gvidas al la celo. Eĉ tio estas - vole nevole - kontribuaĵo al la progreso de nia ideo.

Prof. Dr. Rudolf H o r s k ý, Praha

1. Januaraj kaj aŭgustaj okazintaĵoj en mia patrujo. La programo de socialismo kun homa vizaĝo devis ekinteresi ĉiun civitanon de nia ŝtato, eĉ de la tuta mondo. Bedaŭrinde la aŭgustaj okazintaĵoj iomete haltigis nian multpromesan evoluon. Tamen mi firme kredas, ke ni venkos ĉiujn obstaklojn.

2. La terora mortigo de la du signifaj homoj: pastoro M. L. King kaj R. Kennedy. Iliaj mortoj estas tre granda perdo por la paca movado kaj por la homaro entute.

3. La kongreso en Madrid, kiun mi partoprenis kaj ĝis nun la plej granda kunveno de kristanaj esperantistoj en Limburg (Komuna kunveno de KELI kaj IKUE). La Limburga Kongreso estis historia paŝo en la kunlaboro de protestantoj kaj katolikoj.

Jaroslav H o š e k, Gottwaldov

1. Spite al neimageblaj malhelpaĵoj realigita Dekkvara Eksterordinara Kongreso de KPĈ la 22. - 23. de aŭgusto 1968. Naskiĝo de Slovaka kaj Ĉeĥa socialismaj respublikoj.

2. Vere impona morala apogo kaj simpatio de - certe! - du miliardoj da homoj kaj preskaŭ de ĉiuj nacioj de la Terglobo, plena de espero dum tristaj okazintaĵoj en la tria aŭgusta dekado.

3. Prelego de s-ano Ivo Lapenna pri lingva problemo de la homaro en la malferma kunsido de la 53-a Kongreso de UEA en Madrido kaj saluto de nia delegito s-ano Mikuláš Nevan.

ENKETO DE STARTO ENKETO DE STARTO ENKETO DE STARTO ENKETO DE STARTO ENKETO DE ST

MUDr. Josef H r a d i l, Český Dub

1. La aktiveco de kelkaj kluboj (Třebíč, Jablonec) kaj de kelkaj unuopuloj. Malfavore impresis min la fakto, ke niaj tegmentaj proponitaj organizaĵoj ankoraŭ ne funkcias. (Aliaj organizaĵoj, ekzemple Junák, renaskiĝis sen malfacilaĵoj)

2. La publikita kverelo inter UEA kaj Andreo Cseh same kiel estinte kun Hans Jakob. Ĉe niaj estroj ofte mankas pripensemo kaj konkordeco.

3. IOE volas aŭ nevole konkurencas al UEA. Ĉiuj niaj superaj organizaĵoj devus esti sub unu tegmento kondiĉe, ke estus rompitaj baroj de nepagipovebleco. Protesto de UEA kontraŭ lingva diskriminacio ŝajnas al mi netaktika, ĉar ĝenerala opinio pritraktas nian movadon plimalfortigitan kaj la protesto povas veki ĉe potenculoj de la mondo kontraŭagon, mokon aŭ mokigon.

Zdeněk H r š e l, Brno

1. La aktiviĝo de la junularo sub la gvido de nia senlaca Mikuláš Nevan. La junularo konsistigas unu el la kondiĉoj por la estonto.

2. La protesto de UEA pri lingva diskriminacio en la konferenco de neregistaraj organizaĵoj pri homaj rajtoj en septembro. Ankaŭ tie la prezidanto de UEA montriĝis kiel bonega diplomato.

3. La senlaceco kaj principa optimismo de tiuj funkciuloj, kiuj konscias pri la malfortaj flankoj de la movado kaj scipovas reale pritaksi giajn eblojn.

Josef C h v o s t a, Poděbrady

1. La ago de ČSEK instigita de s-ano Mikuláš Nevan pri la preparo de lernolibroj. Impona estis precipe la prepariteco de la junularo pretigi en la plej mallonga tempo la tekstojn.

2. Eksterlandaj esperantistoj sopiris ricevi bonajn kaj fidindajn informojn pri la okazaĵoj en aŭgusto kaj la plimulto - kun escepto de kvin landoj - aprobis nian starpunkton.

3. La informado pri nia ĝusta starpunkto nepre estis rekono de la internacia lingvo, kiu ĉesas esti nur ludilo kaj iĝas grava komunikilo en la interhomaj rilatoj.

Dr. Jaromír J e r m á ř, CSc, Praha

1. La fakto, ke la ĉeĥoslovaka esperantista movado komencis sin organizi sub pafiltuboj de fremdaj armeoj.

2. La fakto, ke kelkaj esperantistoj, speciale la bulgaraj (vidu Nuntempan Bulgarion 1968/9, La Paca Aktivulon 1968/77), sed ankaŭ la aliaj pli bone konas la situacion en Ĉeĥoslovakio ol la ĉeĥoj kaj slovakoj mem. Ili eĉ sukcesis trovi ĉe ni kontraŭrevolucion kaj konas tiujn, kiuj invitis fremdajn armeojn eniri Ĉeĥoslovakion. Ni ankoraŭ ne.

3. La fakto, ke absoluta plejparto de tutmondaj esperantistoj simpatias kun ni, kredas al ni, kaj ne al aŭtoroj de Blanka libro pri Ĉeĥoslovakio kaj aliaj mensogaj pamfletoj, eĉ se ili aperas en Esperanto.

/daŭrigota en la venonta numero/

ENKETO DE STARTO ENKETO DE STARTO ENKETO DE STARTO ENKETO DE STARTO ENKETO DE ST

. - o - O - o - .

**LITVA** zavedla na svých středních školách jako první v SSSR vyučování esperantu. Vyučování je nepovinné a kurs pozůstává z 52 lekcí po 1,5 hod. týdně. I když je citelný nedostatek učitelů (esperanto bylo v SSSR od r. 1937 zakázáno) kursy začaly již na 19 školách.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++
KLUBY HLÁSÍ ooo KLUBOJ RAPORTAS ooo KLUBY HLÁSÍ ooo KL
++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

JABLONEC EK v Jablonci, který má již 65 platících členů, oslavil v lednu své druhé výročí. Na slavnostní večer přijela také delegace z Jelenie Gory v Polsku. Přátelé z družebních měst NDR se omluvili; z Polska, MLR, NDR, Jugoslávie, Holandska a ČSSR přišlo 16 pozdravných telegramů. Klub obdržel ke svému výročí uznání za vzornou práci.

MOR.BUDĚJOVICE La nove fondita EK aranĝos la 4-an de aprilo Letervesperon. La prezidanto de la klubo petas la esperantistan mondon - skribu al ni ! En aprilo (21.-27.4.69) oni krome aranĝos ekspozicion por propagandi Esperanton. La klubo vokas ĉiujn geesperantistojn - helpu kaj sendu diversajn materialojn je la adreso: ESPERANTO KLUBO, Moravské Budějovice. Ĉiu sendaĵo estos respondita.

OSTRAVA EK při DK VŽKG ve spolupráci s výrobně technickou propagací podniku vydal prospekt k 140. výročí založení VŽKG. Pro vaše zahraniční korespondenty má kroužek k dispozici i větší počet výtisků. Záslohou s.Pečky tamtéž byly vydány sítotiskem esperantské vlaječky, formát 28x11 cm, vhodné do klubovny, automobilu apod. Cena 12,-Kčs, při větším odběru sleva.
V Domě pionýrů v Ostravě - Mariánských horách probíhá kurs esperanta pro 15 dětí. Učitel Gustav Heczko je honorován. Je zajímavé, že vedoucí Domu pionýrů si sám založení kroužku vyžádal, aniž je esperantistou. V tisku se dočetl, co to je esperanto a myšlenku se mu zalíbila.

VSETÍN Vastan eĥon eksterlande vekis la eldono de "Interesa legaĵo" fare de la loka EK. Skribis i.a. Marjorie Boulton, William Auld, J.A.Tuinder, prezidanto de IKUE kaj aliaj. Librejo de la eldonejo N O V A el Francujo havas intereson pri la libro, kiun ĝi povus disvendi se eble en ekskluziveco.
Anoj de la rondeto en Vsetín elkore dankas al ĉiu, kiu sincere subtenas ilian laboron, ĉu per la aĉeto de la eldonaĵo, ĉu per konsiloj aŭ bonintenca kritiko. Ĉiun leteron aŭ karton ( kaj estis da ili pasintjare pli ol 5 000 ! ) oni atente legas kaj konsideras.

x-x-x-x-x-x-x

N i e k s c i i s , k e . . .

... s-ano T.M.Bohun invitas ĉiujn esperantistojn en la nomo de ER partopreni dum Pasko (5.4.) la bivakfajron kun programo. Kiu mendos la tranokton pli frue, ricevos pli bonan lokon. Skribu: T.M.Bohun, Nová Paka, Na tržišti 733.

... post prelego de s-ano M.Hruška, fondiĝis nova E-rondeto ĉe KASS en Semily.

... s-ano d-ro Hradil el Český Dub preparas specialan eldonon de loka bulteno "Verda familio", destinita por unuopuloj kaj malpli aktivaj esperantistoj en la ĉirkaŭaĵo.

... EK en Šumperk eldonis la duan kajeron de junularkantaro de J.Cink. Ĝi enhavas 41 kantetojn de la tuta mondo kaj originalajn kaj tradukitajn. Prezo 5,-Kčs por unu kajero; mendojn akceptas J.V.Otta, Nerudova 32, Šumperk.

Odešel skvělý člověk a přítel

Dne 17. prosince 1968 zemřel v Brně pan Josef F r i e d r i c h, čestný předseda Klubu esperantistů FKO v Brně, delegát UEA, esperantista od roku 1906. Za první světové války žil jako válečný zajatec na východní Sibiři s J. Baghym. V roce 1917 odjel jako legionář do Francie. Po návratu se stal právníkem u státních drah v Košicích, kde založil esperantský klub velmi prosperující a odtud řídil akce celostátního významu. Byl dlouholetým členem výboru Československého esperantského svazu a později, od roku 1939, jeho předsedou. V roce 1939 přesídlil Josef Friedrich do Brna jako vrchní rada státních drah. Trvalým památníkem jeho organizačních schopností bylo uspořádání 8. celostátního esperantského sjezdu v Brně v roce 1950, kdy předsedal místnímu sjezdovému výboru. Vzpomínáme na zesnulého pana Friedricha jako na velmi dobrého člověka, skvělého přítele a vynikajícího pracovníka esperantského hnutí, kterému věnoval přes šedesát let svého velmi činného života.

Pohřbu se zúčastnilo mnoho jeho přátel a členů Klubu esperantistů v Brně. S drahým zesnulým se rozloučil jménem klubu a všech jeho přátel J. Vondroušek.

% % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % %

Tragika pereo

dum aŭtomobila akcidento trafis edzinon kaj dudekjaran filon de nia amiko Cor de W a a r t el Amsterdamo, kiu en decembro 1968 estis en Mariánské Lázně por kuraci sin kaj pro la tragedio devis interrompi la restadon en nia lando kaj reveni hejmen. Liaj edzino kaj filo ĝuste veturis por viziti lin. S-ano de Waart, kiu vivis kelkajn jarojn en Plzeň kaj havas multajn konatojn en Ĉeĥoslovakio, mem petis anonci tion al ili...

Tiun ĉi informon kun bondeziroj kaj aliĝilo por STARTO sendis al ni s-ano Milan N e u b e l e r el Poprad. Dankon.

% % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % %

Sekcio de instruistoj de ĈSEK

petas alsendi informojn pri la instruado de Esperanto en tiu ĉi jaro (en pasinta periodo). Indiku, ĉu ĝi estis en la lernejo aŭ ekster ĝi, kaj notu samtempe la kategorion de la lernejo, en kiu la instruado okazas (okazis). Aliaj detaloj: komencantoj/progresintoj, aĝo kaj nombro de kursanoj, adreso, profesio kaj kvalifiko de la instruanto. La sciigojn bv. komuniki al Karel K r a f t, Oboříště 107, (Příbram).

Teknika sekcio (sekr. Inĝ. Jan Werner, Kroftova 84, B r n o 16)

planas organizi ĉijare 2 – 3 tagan konferencon aŭ seminarion en iu montarkabano en Slovakio. Dum tiu ĉi aranĝo oni intencas pritrakti organizajn problemojn kaj aŭskulti kelkajn fakajn prelegojn. La 55membra sekcio vokas pluajn kunlaborantojn.

% % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % %

JE TO VŮBEC MOŽNÉ.......? Světové setkání esperantistů! Pod tímto titulkem uveřejnila Jihočeská pravda 28. 11. 1968 ohromující zprávu, která tvrdí, že "o letních prázdninách se právě v našem kraji, v Soběslavi, uskuteční c e l o s v ě t o v ý s r a z e s p e r a n t s k ý c h s v a z ů, který potrvá 14 až 28 dnů" (!) Budeme tedy soběslavským držet palce ze všech sil, aby se jim vše organizačně vyvedlo, ale odmítáme přijímat přihlášky.

% % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % %

**NAŠE ČTENÁŘE UPOZORŇUJEME, ŽE STARTO, KTERÉ OD PŘÍŠTÍHO ČÍSLA BUDE VYCHÁZET JAKO ORGÁN ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU, BUDE ZASÍLÁNO ČLENŮM SVAZU ZDARMA. DOBROVOLNÉ PŘÍSPĚVKY NA TISKOVÝ FOND JSOU VÍTÁNY.**

% % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % % %

S T A R T O – vydává Přípravný výbor ČES – OÚ v Praze – eldonas Preparkomitato de ČEA – Kleriga Instituto en Praha. Řídí redakční rada – gvidas redakcia komitato: Jaroslav Mařík, Mikuláš Nevan, Ing. František Sviták, Ivo Železný. Odpovědný redaktor – responda redaktoro Oldřich Knichal. Adresa red.: Blanická 4, P r a h a 2

Korespondados Josef P r o z e k, 36 jara laboristo, Sadová 1105, Pelhřimov, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj